Gekamaradoj, la kongreso finiĝis. Ni revenu en la mondon renaskiĝintaj, kun nova forto por disvastigi nian karan lingvon kaj kun la deziro pligrandigi nian organizon per varbado ne nur de novaj, sed ankaŭ de eksmembroj.
Pro la saĝa propono de Rotterdam 2a F.L.E.. ne mortis. Vivu la Asocio de Laboristaj Esperantistoj en la regiono de la nederlanda lingvo F.L.E.!

Mi fermas la kongreson!

La kongreso kantas „la Internacion" kaj disiĝas. Unu la alian adiaŭas per „ĝis revido en Heerlen". Estis bona kongreso kiu pro la aranĝo de la VARA efikis propagandcele, ĉar parto estas elsendita per la radio.

TRA LA ESPERANTO GAZETARO

Amerika Esperantisto, oficiala organo de la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko. Artikoloj kaj informoj pri Esperanto. Zorge redaktita, ĝi donas bonan impreson. Adreso: 114 West 16th. Street, New York, 11, N.Y., Ameriko.

Arbetar Esperantisten (Laborista Esperantisto), organo de la Sveda L.E.A. aperas regule monate kun parto destinita por la Dana L.E.A. Donas informojn pri la laborista Esperanto-movado en tiu regiono.
En ĉiu numero atestoj de solidaraj sentoj kun la esperantistaro en la trafitaj landoj. Subtenas fervore al S.A.T. Kelkfoje belaj ilustraĵoj. Adreso: Barnhusgatan 8. Stockholm, Svedio.

O Brasil Esperantisto, organo de la Brazila Esperanto-Ligo. Ni ankoraŭ memoras la sukceson de la deka kongreso de ĉi tiu asocio. Evidente en Brazilo la Esperanto-movado ĝuas oficialan subtenon ankaŭ moralan. Pri tio ankaŭ atestas la enhavo de la bonaspekta gazeto.
Adreso: Praca da República, 54-sob. Rio de Janeiro, Brazilo.

The British Esperantist, organo de B.E.A., aperas regule, pleigrandparte en angla lingvo. Kongreso okazis 7—10 de junio. Redakcia adreso: 14, Holland Park Avenue, London, W 11, Anglio.

Dansk Esperantoblad, eldono de la Centra Dana Esperantista Ligo.
Bonaspekta organo dulingva kun organizaj informoj, propagandaj artikoloj, k.t.p. Atestas pri vigla movado. Same kiel en la sveda organoj oni konstatas la solidaran kunsenton kun la en la milito trafitaj popoloj; spite al propraj perdoj ili ne hezitis entrepreni helparanĝon.
Adreso: E. Windeballer, Aalokkehaven 24, Odense (anoverhavende), Danlando.

Esperantobladet, Norvega Esperantisto, organo de Norvega Esperantisto-Ligo. Atestas pri bonega refortiĝo. Ĝi bone aspektas, kvazaŭ la milito senrimarke forglitis al ĝi, Gratulon! Adreso: Boks 942, Oslo, Norvegio.

La unuaj numeroj de la 43a jarkolekto de **Esperanto Katolika**, monata Esperanto-revuo, oficiala organo de I.K.U.E. jam aperis. Redakcio: L. G. C. de Jong. Belaspekta, ilustrita revuo kun interesaj artikoloj katoliktendencaj. Informoj pri I.K.U.E. Adreso: Roelof Arendsveen, Nederlando.

Flandra Esperantisto, eldono de la Flandra Esperanto-Instituto V. z. W. Interesa gazeto kun diversspecaj artikoloj. Rubrikoj: Observoj; Nieuwsdroppels (novajoj); La studanto (lingva); Plaatselijk nieuws (lokaj komunikoj); Konkursoj, enigmoj kaj premioj. Adreso: Pieter van Humbeekstraat 3, Brussel, West. Belgio.

Global Thinking, en la angla kaj esperanta lingvoj. Dumonata gazeto. Adreso: 4321 Fourth Avenue. Detroit 1, Michigan, Usono.

Helena Esperantisto, dumonta organo de helenaj Espeantistoj. Dulingva, esperanto kaj greka lingvo. Artikoloj pri la spertoj de la greka popolo dum la milito, donas bonan bildo pri la teruraj okazaĵoj en tiu lando.
Adreso: Str. Rodou 23, Athenoj (8) (Helenujo — Hellas).

Informilo, organo de N.C.E.V. (Nederlando Kristana Esperanto-Asocio). Provizora komitato: C. P. Brakké, Vlierboomstraat 666, Den Haag.
Enhavo: Asociaj informoj, artikoletoj kaj lingvo-rubriko.

La Internacia Bulteno, oficiala organo de la Internacia Asocio de Poŝtmark-kolektantoj. Dulingva gazeto. Adreso: X.P.D.O.-House, Didcot, Berks, Anglio.

Paco kaj Justeco, organo de la neŭtrala esperantonmovado en Brugge. Adreso: J. en M. Sabbestraat 12, Brugge, Belgio.

★ LIBRO-SERVO

Postbus 8002, Amsterdam W., Postgiro 111278.

Zo juist verschenen:

Mi serĉis oron kaj oleon, sed trovis..... de Davis Flood, tradukita el la sveda lingvo de Karl Gustafsson.
Interesa priskribo pri la aventuroj de sveda laboristo, kiu elmigris al Ameriko por trovi tie sian feliĉon.
Prijs f 3.50 (ingen.), *f 4.50* (geb.).

Londonanidoj, orginale verkita de Donald W. Munns.
Interesa libro por gejunuloj 10-15-jaraj pri la lernejanoj, kiujn oni en 1939a evakue forsendis el London. La aŭtoro estis mem 14-jara, kiam li verkis la libron.
Prijs f 1.50.

Tra densa Mallumo, Esperanto-eseoj pri movado kaj lingvo, jubilea eldono de laborista Esperanto-Klubo en Kopenhago.
Kluba Kavalkado, La nuna stato de la Esp.-movado kaj ties perspektivoj en la estonto. La esperantologio kaj ties disciplinoj.
Enhavas sciindaĵojn por ĉiu esperantisto, speciale por la novuloj, kiujn la verko enkondukas en la movadon.
Prijs f 1.35.



BESTUURS MEDEDELINGEN

Propaganda-congres.

Zaterdag 7 Sept. belegt het N.C.K.E. (Nederlanda Centra Komitato Esperantista) een propagandacongres in het N.V.-Huis te Utrecht, dat zal plaats vinden van 2—5 uur. Daar verwachten wij vertegenwoordigers van onze afdelingen en districten, welke ook van de andere in het N.C.K.E. deelnemende organisaties aanwezig zullen zijn. Nadere mededelingen volgen in Augustus.

Radio.

Op *Zaterdag* 6 *Juli a.s.* van 4.15 tot 4.30 uur, spreekt k-do Bas Wels voor de VARA, over: „Esperanto in de praktijk". Zaterdag 3 Aug. eveneens een uitzending. Onderwerp nog niet bekend.

Libroservo.

De Libroservo is van 22—27 Juli wegens vacantie gesloten, zodat in die week geen bestellingen kunnen worden uitgevoerd.

Nieuwe afdelingen.

Opgericht is de afd. *Lochem*. Secretaris k-do D. J. Oudenampsen, Bergweg 14. De afdeling Scheveningen is heropgericht.

L.E.

Copy voor ons orgaan moet uiterlijk de 20e van elke maand in het bezit zijn van den redacteur, k-do H. W. Alings, Middenweg 226, A'dam (O.), opdat L.E. steeds op de 1e der maand kan verschijnen.

JUBILEA DONACO.

La Asocia estraro tutkore dankas la donacintojn pro ilia oferemo. Entute ni ricevis pli ol 1.000 gld., parte pere de la A'dama distrikto, parte rekte al nia adreso. En sekvonta L.E. aperos listo pri la donacoj rekte pagitaj al nia Asocio.
La estraro tre alte taksas tiun ĉi financan oferon de la anaro. Pasintjare ni ricevis pli ol 800.— gld. por refunkciigi nian organizon, kaj okaze de nia 35-jara pubileo denove donacon de pli ol 1.000.— gld!
Ni intencas aĉeti adresilon kaj ni opinias tian destinon de la donaco en la senco de la donacintoj. Tiu ĉi aparato ebligos al nia funkciulo sendi individue al la anoj L.E. kaj La Progresanto. Per tio la sekciaj estraroj estos malŝargataj, dum la anaro pli frue kaj pli regule ricevos la gazetojn.

Flugfolietoj.

Okaze de la unua de majo ni disdonis 100.000 flugfolietojn. Por la balotado en julio ni intencas eldoni, se eble, milionon da ili. Urbaj sekcioj mendu tuj ĉe la distrikta sekretario, aliaj mendu ĉe la Asocia estraro — Postbus 8002, Amsterdam-W.
Se vi scias pri grandaj kunvenoj informu nin pri la celo, la loko kaj dato de ili.

La Petskribo.

La kongreso decidis post la klarigoj de la estraro, ne partopreni en la agado por la petskribo de IEL.
Tamen subskribo de deklaro ne estas konsiderata kiel maldisciplina ago, ĉiu membro decidu eventuale por si mem, ĉu li subskribu aŭ ne.
La decido de la kongreso estas bazita sur la postulo de seriozeco kaj demokrateco en tia afero kaj ne sur la deziro kontraŭlabori.

EL LA ASOCIA ESTRARO.

Raporto pri 2 kunvenoj, kiuj intertempe okazis. En ambaŭ kunvenoj la Petskribo de I.E.L. surtabliĝis. En la N.C.K.E. oni detale priparolis ĉi aferon, sed ne atingis interkonsenton. Kvankam L.E.E.N., kiel landa sekcio de I.E.L., kaj I.K.U.E. subtenas la Petskribon, nia Asocio decidis ne humiliĝi antaŭ I.E.L. (vidu la frontpaĝon L.E. No. 3 de marto 1946a). Nia organizo subtenos Brazilion kaj eventuale Ĉehoslovakion en iliaj klopodoj enkonduki Esperanton en la U.N.O. pere de la Nederl. Registaro, kiu estos petata instigi en tun direkton. Laŭ deziro de la Kongreso la Konsilantaro estos pli vastigata per k-do Suurmans, kiel reprezentanto de la Komitato Esp. ĉe la Instruado, k-do Kroonder kiel la fakulo el la Libroservo-Komitato kaj k-do Bas Wels kiel landa S.A.T.-peranto, dum k-do Degenkamp reprezentos la Ekzamenan Komitaton.
Post esploro, kiel signifo de la aldonliteroj F.L.E., estis akceptata „Fidu la Estontecon". Ĉar k-do Veen ankoraŭ estas malsana kaj post tio certe ne tuj povos plenumi sian funkcion, laŭ deziro de la Estraro, k-do Faulhaber provizore transprenos lian taskon. Per tio ni malŝarĝas la troan laboron de k-do Kruit, kiu ĝis nun prezidis la kunvenojn kaj transprenis la taskon de k-do Veen kiel prezidanton de la N.C.K.E.
Kiel jam anoncite en Alkmaar, okazos komuna Kongreso de la 4 landaj organizoj en Utrehto. La dato estis en la N.C.K.E. fiksata je la 7a de Sept. proksima en la „N.V.-Huis" de la 2a ĝis la 5a horo tagmeze. La estraro deziras starigon de honorkomitato el kelk j konataj eminentuloj diverstendencaj dume eksterlandano parolos.
Propono de L.E.E.N. en la N.C.K.E. por eldoni komunajn asocio- kaj studgazetojn post detala priparolo ne trovis aprobon.
Proponon de N.C.K.E. koncerne komunan broŝuron pri Esperanto por la ĝenerala propagando ni akceptis. La nomita komitato konsideros la problemon.

D.k.

DE LA GAZETARSERVO.

Post novembro 1945 aperis en la nederlanda gazetaro multaj novaĵoj pri nia lingvo. Tiu ĉi listo mencias la gazetojn, kiuj inter novembro 1945 kaj la 1-a de majo 1946, enpresigis novaĵojn kaj sciigojn pri Esperanto kaj nia Asocio.

Aalsmeerder Courant, Arnhemse Courant, Bibliophiel, Bilthovense Courant 1×, Chemisch Weekblad, Dagblad voor Amersfoort 2×, Deventer Courant, De Duinstreek 1×, Garnizoenspost 2×, De Gids, (portas en la kapo Esperanto parolata), Gooische Courant, Hengelosch Dagblad, Ick Waeck, Jeugd 1×, Kennemer Koerier 4×, De Koerier, de Kroniek, Het Laatste Nieuws, Limburgs Dagblad, Mercurius, Nat. Rotterdamse Courant, Nwe Drentse Courant, Nwe Langedijker Courant, Nwe Winterswijkse Courant, Nieuwsblad voor Tietjerksteradeel 1×, De Ochtendpost 3×, Ons Orgaan (Ministoj) 1×, Ons Orgaan (Fervojistoj kaj tramistoj) regula rubriko, Op Korte Golf, Het Parool (Amersfoort kaj Amsterdam), De Patriot, Lux Mundi, De Typhoon, Vakblad voor Biologen 1×, De Vlam 2×, Vrij Nederland 1×, De Vrije Alkmaarder 3×, De Vrije Hoornse Courant 1×, De Vrije Socialist 3× (Nun regula kolono), Vrije Stemmen, Vrije Twentse en Achterhoekse Courant 1×, Het Vrije Volk (Amersfoort 6× Den Haag 2×, Het Vrije Volk ceteraj eldonoj 16×, De Waarheid (Amersfoort 14×, Groningen, Drente, Overijssel 12×, Den Haag 6×, Leeuwarden 1×, N.-Holland 9×, Twente 6×, ceteraj eldonoj 3×), Weekblad der Belastingen 1×, Welvaart voor Allen 2×, Wij Vrouwen 1×, De Zaanstreek 3×, Het Schoolblad, Graficus 1×.

El tiu ĉi listo montriĝas ke nia sekcio Amersfoort estas la plej aktiva sur tiu tereno. Ĝi sukcesis en 5 monatoj 22 fojojn enprisigi ion en la gazetoj de Amersfoort.
El la nederlandaj gazetoj „De Waarheid" plej favoras nin. Tamen ni dezirus ke ĝi, „Het Vrije Volk" kaj aliaj ĵurnaloj en la grandaj urboj pli atentus la aferon de Esperanto.
Ne jam ĉiuj distriktoj kaj sekcioj anoncis siajn gazetarservantojn. Vi nepre faru tion.

fdv.

Uitspraak „Esplorkomisiono".

In verband met de beschuldiging in L. E. 14e jg. No. 7, tegen den heer P. Krijt en diens verweer, opgenomen in L. E. 15e jg. no. 1, werd door F.L.E. een commissie benoemd, bestaande uit de heren: G. Brugman (FLE), S. J. Jansen (NK) en Mr. A. J. Kalma (LEEN), om deze kwestie nader te onderzoeken. Met de publicatie van het resultaat van dit onderzoek in L.E. zal de zaak als afgedaan worden beschouwd.
De commissie heeft gemeend, in het belang van een objectieve behandeling van de zaak, niet uit te moeten gaan van de in L. E. over deze kwestie gepubliceerde artikelen en de correspondentie, naar aanleiding daarvan over en weer gevoerd, doch een geheel zelfstandig onderzoek te moeten instellen.
Na verhoor van een aantal getuigen (niet-esperantisten) en den heer P. Krijt, is de commissie, hoewel van mening, dat de plaatsing van de beschuldiging in L.E. 14e jg. no. 7, als zijnde toen nog onbewezen, voorbarig was, tot de conclusie gekomen, dat, aangezien in verschillende gevallen het gedrag van den heer P. Krijt in de bezettingsjaren zich gekenmerkt heeft door een laakbare houding, bovenbedoelde beschuldiging, althans voorzover het betreft de volgende passage — ĉar nomita Krijt estas suspektinda persono, kiu simpatie rilatis al N.S.B. — gegrond is gebleken.

w.g. A. J. Kalma. S. J. Jansen. G. Brugman.

—

(Wij wensen hier nog slechts bij op te merken, dat wij tot het instellen van deze ereraad zijn overgegaan, na overleg met den heer Krijt, waarbij werd overeengekomen, dat met de publicatie van de uitspraak in L. E. deze zaak als afgedaan zou worden beschouwd.

Bondsbestuur F. L. E.
W. F. Kruit, secr.



EL LA DISTRIKTOJ

DISTR. AMSTERDAM.

Sekr.: Kijkduinstraat 103.

Amsterdamanoj atentu!
Dimanĉon la *21an de julio* okazos ekskurso al nia famkonata urbeto Volendam sub gvido de k-do Naerebout kaj en Volendam sub s-ro Hartog.
Foriro per Nordholanda tramo matene je 8.30 h. La vojaĝo kostas f 0.75.
Ĉiu partoprenu! H. J. Veldman.

DISTR. FRIESLAND.

La sekretaria kaj kasista funkcioj de la distrikto *Frislando* transiris de k-do J. Tjepkema al k-dino M. Tool—van Essen, van de Veldestraat 11, Huizum, Leeuwarden.

DISTR. GELDERLAND.

Sekr.: Amsterdamseweg 30, Arnhem.

La nuna distrikta kernkurso post la milito okazis dimanĉon la 19an de Majo en Apeldoorn. Parolis por ni K-do H. P. Schoonenberg, antaŭa Fed. estrarano, pri Esperanto-Literaturo kaj k'do Henstra, la distr. prezidanto pri la kongreso en Alkmaar kaj ĝiaj konsekvencoj por ni.
Ĉeestis proks. 45 gekamaradoj, inter kiuj kelkaj gastoj el la distr. Overijsel kaj kiel reprezentanto de la distr. Utrecht, K. do Labordus el Zuilen.
Posttagmeze ni ekskursis sub gvidado de kelkaj Apeldornaj gekamaradoj al la belega parko „Berg en Bosch", kaj trinkis teon ĉe alia kamarado.
Dum la somero aŭ en la aŭtuno ni intencas okazigi similan renkontiĝon, ĉar ili multvaloras, ili estas lernigaj kaj instigas al plia aktiveco, sed super tio plifortigas la kamaradecon.

DISTR. LIMBURG.

La duan pentekostan tagon la Distrikto Limburgo ekskursis al Valkenburgo. Ni vizitis la panoraman turon, de kiu ni rigardis trans vastan montetriĉan regionon ĝis en Belgio kaj Germanio. Poste ni iris al la subĉiela teatro kaj tre trinkis kafon. Entute: tre agrabla tago kaj la gek-doj restintaj hejme pro la minacanta vetero multe perdis.
La*21an de julio* parolados franca kamarado (ministo) pri vivo kaj laborkondiĉoj en sia lando en „De Burcht" Brunssum je la 10a matene. Ĉiu ĉeestu!

DISTR. ROTTERDAM.

La 12an de Julio okazos nia interestrara kunveno, en kiu partoprenos la distrikt-estraro kun la estraroj de la sekcioj. Sed ekzistas por la aliaj membroj okazon viziti tiun kunvenon kiel gasto. Oni montru intereson pri niaj organizaj laboroj per veno al *Rusthoflaan 53.* Komenco je la 8a horo.

DISTR. UTRECHT.

La estraro kunvenis la 2an de junio en Amersfoort. Partoprenis je nia ĝojo ankaŭ k-do Knip, la antaŭmilita prezidanto kaj konsilanto de nia distrikto. Pro falsa akuzo li troviĝis longan tempon en postmilita koncentrejo. Ni kredis lin senkulpa kaj tial rezervis por li la de li okupitajn funkciojn. Li finfine akiris la eblon por pruvi sian senkulpecon. Pro la suferoj lia sanstato ankoraŭ ne ebligas al li transpreni jam nun la laboron de la anstataŭanto, k-do van Dijk. Ni volas, ankaŭ el ĉi tiu loko, gratuli lin kaj lian edzinon pro la liberiĝo kaj esperas, ke li baldaŭ estu resaniĝinta.
Nome de la distr. estraro: van Dijk.

AMSTERDAM SAT-RONDO.

Dimanĉe la 2an de junio okazis ekskurso al la Zaan-regiono. La gek-doj, kiuj kuraĝis spiti la pluvon kaj venton, tute ne bedaŭris siajn penojn.
Niaj invitintoj, la Zaanlandaj Sat-anoj, aranĝis bonan programon. Per aŭtobuso ni veturis al Zaandijk. Tie ni amuzis nin per interparolado, kantado kaj muziko. Tagmeze ni vizitis muelejon kaj muelilmuzeon. Kun tre interesaj aferoj ni konatiĝis, sed por bone rigardi kaj observi ĉiujn vidindaĵojn oni bezonas pli da tempo. Tial ni ripetos la ekskurson. *La sekvonta ekskurso estos al Volendamo je la 21a de julio* kune kun la Amsterdama distrikto de F.L.E. La sekciaj perantoj do bone atentu la tiurilatajn komunikojn de la distriktestraro!
La perantino,
H. Oudenhooven—Bishoff,
Bestevaerstraat 127³, A'dam-W.



EL LA SEKCIOJ

SEKCIO AMSTERDAM V. GRUPO ZAMENHOFA.

Sekr.: Marco Polostraat 64 ¹.

La28an de Majo '46 okazis nia jarkunveno, la unua postmilita.
La sekretaria raporto estis aprobata sen rimarkoj. La plej grava punkto el la tagordo estis la estrarelekto. Kelkaj estraranoj intencis eksiĝi pro principaj aferoj.
Por montri sian aprobon kaj kontenton pri la agado de la estraro en la pasinta jaro, la kunveno aklame reelektis la tutan estraron. Ĝi nun konsistas el jenaj gekamaradoj.
Pres. K-do J. v. d. Stolpe. 2a Pres. K-ino H. Oudenhoven—Bishoff. Kasisto: K-do Bultemeijer. 2a Kas: K-do Marsman, Sekr.: P. Lamfers. 2a Sekr.: B. Bishoff. Redaktoro: F. Oudenhoven. Libroservo: J. Hagendoorn. Assesoro: K-do Klaasen Bos. Bibliotekisto: K-do Vink.
Gek'doj la estraro petas, ankaŭ por la venonta jaro vian moralan subtenon, por ke ĝi povu plenumi la taskon destinitan al ĝi.
P. Lamfers.

SEKCIO AMSTERDAM XIII. „LIBERIGA STELO".

Sekr.: Westlandgracht 145 III.

Ni aranĝos por la komencantoj specialan parolkurson dum la somero. La gvidontoj de la kurso estas la spertuloj el nia sekcio. Tiu, kiu volas partopreni ĉi tiun kurson anoncu sin plej baldaŭ ĉe la sekretario.
La verda monato proksimiĝas kaj tial ni instigas la geanojn jam nun fari preparan laboron, por ke nia propagando estu grandioza. Plue ni petas gehelpantojn por disdoni flugfoliojn aŭ vendi gazetojn dum sabattagmezo.
Rilate al nia unujara ekzistado post la milito ni sciigas, ke nia sekcio sufiĉe kreskas. En la komenco ni havis 38 geanojn kaj nun 53.
Vizitu regule niajn konversacivesperojn, ili estas tre interesaj Kunportu ĉiam *Ni kantu.*
J. Hennekey.

SEKCIO ARNHEM.

Sekr.: Raapopsche Weg 41.

La denove funkcianta kunlaborkomitato en Arnhemo — en kiu kunlaboras la sekcioj de L.E.E.N. kaj de F.L.E. — aranĝos dimanĉon la *21an de julio 1946* ekskurson al la Nederlanda Subĉiela Museo sub la gvidado de s-rino v. d. Wal kaj de k-do Saaltink. Kolektiĝo antaŭ la stacidomo je 10 h. 30. Petu informaĵojn aŭ anoncu vin ĉe la sekretario R. H. Hofenk, Raapopsche Weg 41, Arnhem.

SEKCIO BEVERWIJK. „Frateco".

Sekr.: Berkenlaan 19.

La 22an de majo okazis nia kunveno. Ĝi vere estis sukcesplena. Ĉeestis multaj anoj kaj 2 Svedaj Gekdoj (nia eks-anino v. d. Sluys kaj ŝia edzo).
K-do Meijer informis, ke ni akiros la montrejon de la „Kennemer Koerier" en la Breestraat, dum unu semajno en aŭgusto. Tuj poste ni okazigos ekspozicion.
Nia Gazetarservanto, k-do J. v. Wijngaarden, sukcesis enpresigi dum 5 semajnoj artikolon en „La libera Socialisto".
Ni fondis ŝparkason por iri grandnombre al nia kongreso en Heerlen.
El la komenckurso ni enskribis ses novajn anojn.
K-do J. Wilgenhof gvidos la A-kurson, k-do J. v. Wijngaarden la daŭrigan kurson kaj la B-kurso jam funkcias bone. Do eble ni ankaŭ ĉeestos multope la ekzamenon en 1947.
J. E. Meijer, sekr.

SEKCIO ENSCHEDE.

Sekr.: Van Coeverdenstraat 39.

La unuan merkredon en la monato ni havas oficialan kunvenon. En la aliaj ni pritraktas la lernolibron „Post la kurso" por ĉiuj. La vizitado estas kontentiga. Ne plu ekzistas motivo por foresti.
Ĉijare ni iom feste memorigas la 30-jaran ekziston de nia sekcio. Ni klopodas eldoni gazeton en 10.000 ekzempleroj.

SEKCIO LEEUWARDEN.

Sekr.: Marnixstraat 19.

Nia sekcio, en kunlaboro kun la Frisa Esperantista Rondo, organizis postkursan festvesperon, je la 23a de majo.
Multaj junaj esperantistoj ĉeestis. Unue la lernantoj de F.E.R. aŭdigis kelkajn kantojn, due niaj infanoj prezentis teatraĵon „Vintra ĝuo" de k-dino F. Brinkman.
Ambaŭ grupoj akiris grandan aplaŭdon (Ili jam korespondas kun infanoj el Francio, Anlio, Finnlando k.t.p.!)
K-dino A. M. de Vries—de Jong kaj k-do Ch. Heiner kantis poste spritan dueton.
En la paŭzo loterio.
Post la paŭzo prezentis anoj el ambaŭ organizoj: „Door Esperanto tot Vrede".
Nia prezidanto malfermis la kunvenon, sinjoro Veltman de F.E.R. fermis ĝin.
K-do Heiner ricevis de siaj kursanoj libron, kaj lia edzino florojn. Ankaŭ al la kamaradinoj T. Brinkman kaj C. C. M. Rijpstra—Timmermans la infanoj donis florojn.
La 5an de junio ni restarigis nian infanklubon „La junaj Pioniroj" kun Prezidantino: kam.-ino T. Brinkman; Sekr.-Kas-ino: kamino C. C. M. Rijpstra—Timmermans.

SEKCIO LEIDEN.

Sekr.: Sumatrastraat 21.

La 20an de majo finiĝis niaj du Esperantokursoj. Ni invitis la kursanojn ĉeesti nian konversacivesperon.
La prezidanto bonvenigis la novajn Esperantistojn kaj klarigis niajn planojn por la somermonatoj. Dum la somero ni alternsemajne konversacios kaj pritraktos gramatikon por komencantoj kaj progresantoj. Li instigis la kursanojn aniĝi al nia sekcio.
Post deklamado de iu kamaradino parolis k-do J. Blok, unu el la kursgvidantoj pri la finitaj kursoj kaj pri sia vojaĝo al Francujo. Per tiu interesa parolado li konvinkis la eks-kursanojn, ke Esperantisto povas viziti ciun landon, nekonante la tie uzatan lingvon.
Post la paŭze ni faris ludon Esperanlingve, kiun ankaŭ niaj gastoj bone komprenis.
La prezidanto sciigis ke la flugfolietoj, kiujn nia sekcio ricevis el Amsterdamo, estas disdonitaj ĉe la enirejo de la urbsalono dum la elekt-kunvenoj de la politikaj partioj. Per kantado la kunveno estas fermita. Anoncis sin *13 novaj anoj* por nia sekcio.

SEKCIO ROTTERDAM VII.

La 7an de junio nia sekcio ekzistis 13 jarojn kaj tion ni feste rememorigis.
Ni havis en nia mezo multajn gastojn. Ĝojiga fakto estis ankaŭ la ĉeesto de delegito de L.E.E.N. kaj kamarado el la katolika esperanto-movado.

La programo prezentis muzikon, komunan kantadon, humoriston, nederlandan deklamajon (por la ne-Esperantistoj) kaj fine k-do van Willigen kun la sekcia teatraĵgrupo amuzis nin per malgranda, memfarita revuo.
Je ĉielirtago nia sekcio jam havis antaŭfeston en la formo de boatvojaĝo al Schoonhoven. Tiu maniero montriĝis taŭga propagando, ĉar ni atentigis la tutan publikon al nia mondlingvo. v. D.

SEKCIO SCHEVENINGEN.

Sekr.: Zandvoortstraat 11.

Sekcio Scheveningen denove fukcias. Malgraŭ niaj klopodoj ankoraŭ estas etaj, ni sukcesis konversacii ĉiun Lundon ĉe K-do: Brooshoofth hejme. Willem Kuiperstraat 90. Gegule vizitas dekduo da Gekdoj tiujn lernigajn vesperojn.
Konsistanta el la malnova kerno, ni klopodu kiel eble plej baldaŭ rekonstrui nian antaŭan aktivan sekcion. La cirkonstancoj estas malfavoraj rilate salonojn en nia detruita loko, sed ni iam sukcesos lui konstantan kunvenejon.
Hezitulojn ni instigas viziti la aranĝojn.
D. Varkevisser.

SEKCIO SCHOORL.

Sekr.: W. Selhorst, Voorweg.

La 16 an de majo okazis nia unua kunveno ĉe k-do Braakensiek. Ni elektis la jenan estraron: W. Bont, prez., W. Selhorst, sekr., J. Pool, kasistino, k-dino L. Buit por la libroservo kaj W. Braakensiek, 2a sekretario. La sekcio nombras nun 14 anojn. La gejunuloj aliĝis ankaŭ al T.J.O.
En Aŭgusto ni okazigos ekspozicion en montra fenestro en la mezo de nia multe vizitata vilaĝo. En la verda monato ni volas organizi grandskalan propagandan vesperon.
W. Braakensiek, 2a Sekr.

SEKCIO SLIEDRECHT.

Sekr.: Noorderstraat 15.

La unuan de junio ni festis nian kursfiniĝon. Bedaŭrinde k-dino de Boon—Verschoor, nia kursgvidintino, ne povis ĉeesti ĉar ŝi devis akompani infanojn al Anglio. Ni ĝuis la belan programon kaj la geludintoj vere meritas la aplaŭdojn. Dekkvar roterdamaj gekamaradoj venis al Sliedrecht kaj restis ĝis dimanĉvespero. K-do Pelgrim bonvolis paroladi pri la neceso de la komnuna lingvo Esperanto. Ni povis enskribi kvin novajn membrinojn. Ni esperu, ke ili restu fidelaj.
W. 't Jong.

SEKCIO ZAANDAM-ANTAŬEN.

Sekr.: Schubertstraat 18.

Ni kunvenos *ĵaŭdon la 11an de julio* je la 8a en la ejo Christelijke Belangen Bootenmakersstraat.
Tagordo: Priparolo de la somerlaboro.
En la kadro de la interŝanĝo de Zanlanda kun Readinga sportistoj, ni en kunlaboro kun la samideanoj en Reading (Anglio) penas fari la samon. Komence ni organizos grandskalan korespondadon inter la gemembroj de la du urboj. La S.A.T. ekskurso al la muzeo kaj la muelejo „Het Pink" bone sukcesis malgraŭ la malbela vetero. Niaj anoj atentu la informon pri la sekvonta S.A.T.-aranĝo
En Zandamo nun sur la frontono de la domo de ĉiu ano de nia grupo brilas la verda stelo! Ĝi estas bonega propagandilo

SEKCIO ZUILEN.

Sekr.: Van Egmontkade 49.

La 27an de majo ni havis nian jarkunvenon kaj elektis novan kasiston, nome k-don F. Imrich, de Klerkstrato 45, Zuilen.
Ni fondis ŝparkason por la sekvonta kongreso en Heerlen. Jam pli ol tri semajnojn ni ekspozicias en la du montraj fenestroj de malplena butiko. Ĝi forte altiras la atenton de la preterirantoj.
La 16an de junio 1946 ni aranĝis kun la S.A.T.-rondo prelegon. Parolis por ni k-do Delsen el Amsterdam pri bona stilo. La prelego kaj la vizitado estis bonegaj.
La 23an de junio 1946 ni festos nian dekjaran ekzistadon inter la anoj kaj familianoj.
Ni ankaŭ elektis propagand-, fest-, k.t.p. komitaton por la venonta verda monato. Ni havas grandajn planojn. Dum la somermonatoj ni konversacias semajnalterne je ĵaŭdo.
la sekretario.



ANONCOJ

Laborista Heroldo.

La internacia semajna gazeto deziras ekhavi kontakton kun funkciantoj de laboristaj organizoj en ĉiuj landoj, kiuj scipovas Esperanton kaj kapablas verki bonstilajn artikolojn kaj raportojn pri ĉio kio koncernas laboristaron en sia lando.
Same ni serĉas landajn perantojn por nia gazeto.
Skribu pri la kondiĉoj al
„Laborista Heroldo", Turku, p. lok 48, Finnlando.

—

Internacia kulturo

monata, grandformata, luksa, riĉe ilustrita 16-paĝa gazeto, eldonata de bulgara Esperanto-asocio.
Jarabono 30 respondkuponoj.
Adreso. „Int. Kulturo", str. Gr. Ignatiev 2, *Sofia*, Bulgario. Celo de la revuo estas diskonigi la kulturan, socian kaj ekonomian vivon de la Balkanaj popoloj kaj organizi amasan internacian korespondadon. En ĝiaj paĝoj estas *senpage* publikigataj adresoj de korespondemuloj.

—

Letervespero.

Ni aranĝos letervesperon je la *25a de aŭg.* Ĉiuj leteroj, postkartoj estos respondataj.
Lab. Esp. Grupo „La Espero"
Sekr. Maastrichterlaan 39,
Waubach, L. Nederlando.

—

Korespondo.

Radmila Sakaĉ, 16-jara gimnazianino, serĉas junan korespondanton en Nederlando.
Adr.: Gunduliĉeva 9, *Osijek*, Jugoslavio.

—

Stanislav Matouŝ, 16-jara gimnaziano, deziras korespondi kun juna nederlandanino.
Adr.: U Rajské zahrady 8, *Praha-XI*, Ĉeĥoslovakio.

—

Kie estas k-do Visser?

Antaŭ 11 jaroj vizitis Finnlandon kamarado Josef Visser, kiu venis el Nederlando. Post militkomenco ni aŭdis de li nenion. Kiu scias, bonvolu sendi adreson de li al:
K-do N. Kavenius. Finnlando. *Turku*. Piispankatu 1.

—

NASKIĜOJ.

Kun granda ĝojo ni sciigas al vi, la naskiĝon de nia filo BERT
H. v. Hulst.
J. G. v. Hulst-v. Maasdam.
18 Juni 1946, Oranjestraat 16.
Haarlem, Nederland.

* *

Ni sciigas al vi kun granda ĝojo la naskiĝon de nia filino
FLORA EVELINE
H. A. van Dijk
M. T. van Dijk—Okhuijzen.
La 18an de majo 1946a.
Poelhekkestraat 3, Utrecht, Nederlando.

—

NI KANTU.

La alvoko en la junia L.E. jam multe rezultis. Kelkaj sekcioj kaj kamaradoj donis gravajn sugestojn kaj sendis bone uzeblan materialon. Tamen, necesas, ke ĉiu sekcio skribu. Jam montriĝis ke unu grupo povas profiti per la komunikoj de alia. Ni ĉiuj kunlaboru en la eldono de nova eldono de *„Ni Kantu"*, aranĝota kiel eble plej bone.
Nur kiam ni havas la opinion de ĉiuj kamaradoj, la kompilantoj povas atingi la plej eble bonan rezulton. Legu la alvokon en la antaŭa no. kaj agu laŭ ĝi. A.K.

ALG. NED. ESP. EXAMEN-COMMISSIE.

Examen-uitslagen. Den Haag, 11-5-1946.
Aangemeld voor examen B, 1 candidaat, opgekomen 1, geslaagd 1: N. Wolters, Almelo.
Aangemeld voor examen A, 22 candidaten, opgekomen 19, geslaagd 14: J. F. de Bakker, A. v. d. Beek, C. W. Ch. v. d. Kolk, J. A. M. W. de Ruiter, R. v. Rijswijk, J. W. Siero, H. M. E. Starreveld—van Niel, allen te Den Haag; G. H. Koudijs te Rotterdam; N. Boorsma te Schiedam; G. J. J. v. d. Burg en R. v. Rijswijk te Vlaardingen; C. A. Kratz te Voorburg; J. C. Hinrichs te Wageningen en J. P. v. d. Ham te Wassenaar.

Najaarsexamens voor A en B vinden plaats op 5 Oct. 1946 te Heerlen, 26 Oct. te Utrecht. Aanmelding en inlichtingen tot 6 weken voor het examen bij mej. H. M. Mulder, Zilvermeeuwstraat 29, Badhoevedorp.

—

T.A.G.E.

K-do J. Meijer el Muiderberg informas nin, ke la Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj denove funkcias. Li alvokas ĉiujn instruistojn, anoj de F.L.E. aliĝi. Sekr. de la nederlanda grupo estas S-ro K. H. Sportel, Lernejestro, Nieuw-Scheemda, Post 't Waar (Fr.). Ĉi lasta petas senpagan akcepton de francaj geinstruistoj dum 2—4 semajnoj; kontraŭe nederlandaj samideanoj estas samkondiĉe akceptitaj en Francio.
En „infankolonio" apud Tours aŭ Lyon, organizita de la franca instruista asocio, kien ankaŭ venos anglaj infanoj, povas esti akceptataj 4 knaboj esperantistaj, dum 3—4 semajnoj. Kostoj ĉ. 20 frankoj krom la vojaĝkostoj.
La vojaĝo al Parizo tre verŝajne povas okazi sub gvidado de partoprenonto en la kongreso de la New-Education Fellowship en Julio.
La revenon prizorgos la instruista ligo.
Anonco plej baldaŭ al supra adreso.

FERVOJISTAJ ESPERANTISTOJ ATENTU!

La unua Nederlanda Fervojista Esperantista Grupo en Amsterdamo (sekcio A'dam IV) konsiderante, ke por la plivastigado de Esperanto en fakaj rondoj estas necesa la kunlaborado de ĉiuj samfakuloj, iniciatis la fondon de tutlanda fervojista Esperantista Rondo. Krom efika rimedo por pli profunde enpenetri en la vicojn de la fervojistoj, ĝi estos kontribuo al la konsistigo de forta ligo de solidareco inter la fervojista familio.
Simpatiantoj kiel eble plej baldaŭ anoncu sin al la sekretario,
H. Hoen,
Madurastraat 71[1], A'dam-O.

LIBROSERVO F.L.E.

Ĉi-sube ni donas kelkajn prezojn:

Examen doen	f 1.—
Wat de A-candidaat van de geschiedenis van Esperanto weten moet	f 0.25
De Voorzetsels	f 1.50
Judoj sen Mono	f 2.90
La Perfido	f 2.90
La vojoj estas nekonataj	f 2.10
Unuaj paŝoj, 5 vol.	f 0.75
La Komencanto	f 1.25
Nia Mondo I	f 0.45
Nia Mondo II	f 0.60
Leidraad bij de Studie van Esperanto-literatuur	f 0.45
Gebonden Stijl	f 0.35

Mendu ĉe Libro-Servo F.L.E., Postbus 8002, Amsterdam-W.